


NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice

n-ro 1 (7) / 2001



Invito al la kastelo Tęczyn en Rudno apud Krzeszowice

La plej alta monteto de la montĉeno "Tencina Ĝibo" estas vulkana konuso sur kiu troviĝas pitoreskaj ruinaĵoj de la kastelo Tęczyn (411m). De tie etendiĝas la belega panoramo sur la tuta ĉirkaŭaĵo. Ĉi tiu admirinda vidindaĵo fascinis la reĝon Stanisław August Poniatowski dum lia ekskurso al la ruinaĵo en 1787. Pli frue vizitis tiun lokon inter alie Mikołaj Rej el Nagłowice kaj Jan Kochanowski. Ambaŭ poetoj esprimis sian admiron menciante impresojn el vojaĝoj en siaj verkoj.

Alveni al la kastelo estas facile: sufiĉas el la stacidomo Krzeszowice enbusiĝi direkte Tenczynek, ĉirkaŭ 3 km. Elbusiĝante ĉe la preĝejo en Tenczynek, ni turniĝas dekstren, preterirante malgrandan ponton kaj eniras en arbaron. Ĝia rando reflektas en la ĉarma lageto „Staw Wroński”, la somera ripozloko de loka loĝantaro. La vojo kondukas nin tra la arbaro al la blanka kapeleto ĉe piedoj de la kastelo. Atendas nin ankoraŭ mallonga sed kruta vojeto al la pinto de la kastela altaĵo.

Unua mencio pri kastelo devenas el 1319, kiam krakova kastelestro Nawoj el Morawica konstruis lignan kastelon kun granda ŝtona turo, nomata ĝis hodiaŭ „Navojova Turo”. La ĝusta konstruisto de la ŝtona kastelo estis lia filo Andrzej de kiu komenciĝas la familia nomo Tęczyński. La sekvontaj generacioj de la familio Tęczyński dum tri jarcentoj pligrandiĝis la kastelon laŭlonge kaj laŭalte. Ĝi iĝis la plej grandioza kaj impona sidejo de la fama, signifoplena gento el kiu devenigis 22 vojevodestroj, 23 kastelestroj, 42 starostoj kaj multe da altranguloj laikaj kaj klerikaj. Sume la gento Tęczyński posedis 45 vilaĝojn kaj urbetojn, inter ili 15 proksime de la kastelo. Estas interese, ke en la subtera kastela malliberejo, la reĝo Władysław Jagiełło prizonis militkaptistojn post la grunvalda batalo.

En 1655, la granda kronmarŝalo Jerzy Lubomirski eskapante antaŭ svedoj, disfamiĝis falsan novaĵon, ke la krona trezoro estas kaŝita en la kastelo. Nokte svedoj konkeris la kastelon sed ne trovis la trezoron. La kastelo estis forbrulita. Post tn. „sveda diluvo” la kastelon oni parte rekonstruis, sed en 1768 ĝi denove forbrulis.. De tiu tempo ĝi falis en ruinaĵon. La lasta reprezentanto de la kastelo estis Jan Tęczyński, kiu mortis sen posteuloj en 1638. La kastelon heredis aristokrataj gentoj Czartoryski kaj poste Lubomirski kaj finfine (1816) Potocki. Familio Potocki proprietis ĝin ĝis 1939.

Vizitado de la kastelo eblas senpage, sen gvidanto, ĉiutage. Apud la kastelo okazadas festenoj, piknikoj, kavaliraj turniroj, ludas junularaj rokgrupoj, eblas danci, trinki bieron, kafon, teon. Bruo de muziko kaj odoro de ŝaŝlikoj kaj rostitaj kolbasetoj kaŭzas meznoktan aperigadon de la "blanka damo", kiu malaprobe rigardas malsupren el "Navojova turo".

Barbara Sulowska

KRONIKO

- 10.12.2000. - Ni havis plezuron akcepti du samideaninojn el Bielsko- Biała. Sinjorinoj Bożena kaj Kinga Maria Gierula pasis ĉe ni iom da tempo.
- 21.01.2001. - S-anino Teresa Mazur reprezentis nian klubon ĉeestante la Oblatan Renkonton en Bielsko-Biała.
- 28.01.2001. - Ankaŭ en Gliwice la Oblata Renkonto okazis kun la partopreno de Teresa Mazur. Pri ambaŭ renkontoj ŝi raportis al ni detale.
- 05.02.2001. - Ni kune aplaudis la spektaklon de Jadwiga Gibczyńska „Signaloj” laŭ Karol Wojtyła ,okazinta sur esperanta sceno „Areno” en Ś.O.K. str. Mikołajska 2.
- 11.02.2001. - Dimanĉe je la 9.00 ni ĉeestis esperantan sanktan meson en la preĝejo al S. Adalberto kaj poste kunvenis en la lokalo de katolika klubo ĉe la strato Sienna. La meson celebris kaj la kunvenon gvidis pastro J. Zielonka.
- 14.02.2001. - Por kelkaj semajnoj forveturis al Germanio s-ano Zbigniew Duda. Li senkoste ferias en esperantista domo en Brombachtal, samtempe perfektigante E-on kaj lernante germanan.

Esperanto en „Filipinka”

La nigra centfolia kajero, memoranta kvindekajn jarojn, kuŝas sur la librobreto en la loĝejo de mia simpatia koleginino, Sinjorino Eŭgenia Firek. Mi ŝatus rakonti ĝian historion. Estis 1958 jaro. Eŭgenia frekventis II klason de la Pedagogia Liceo en Krzeszowice. Ŝi ĉiutage akcesvojis al la lernejo el sia hejmo en Radwanowice. Ŝi aĉetadis tiam kaj legadis regule la semajnrevuon adresitan precipe al knabinoj – „Filipinka”.

La 1-an de oktobro 1958 „Filipinka” komencis la kurson de Esperanto. Nun, post jaroj mi malfermas la nigran kajeron de mia koleginino. Sur la unua paĝo la dato, vorto Esperanto same kiel persona kaj familia nomoj – Eugenia Mitońska. Poste – unua leciono.

„Legu: sinjoro kaj sinjorino. Mi estas studento”. Mi rigardas la kajeron. Akurate engluitaj eltranĉoj el la revuo- sume 39 lecionoj de la lingvo Esperanto. Gramatiko, vortoj, legaĵoj’ adresoj por korespondado. Sinjorino Eŭgenia opinias, ke post fino de la kurso, kun helpo de vortaro oni povis memstare skribadi leterojn. En unu el lecionoj estis presitaj la teksto kaj notoj de nia himno. Eŭgenia konas ĝin parkere ĝis hodiaŭ. La melodion ŝi scipovas violonludi. Antaŭ la 44 Universala Kongreso en Varsovio en 1959 „Filipinka” anoncis konkurson. Mi legas: „Lecliono 18. Atento! Atento! La granda esperanta konkurso kun premioj ! I.premio: senpaga partopreno en 44 Universala Kongreso en Varsovio. (La premio fondita per Pola Esperanta Asocio).

II. premio: fotoaparato „Start”.

III. premio: horloĝo. „

kaj 10 esperantlingvaj libroj, inter ili „Doktoro Esperanto” de Maria Ziółkowska kun persona mandediĉo de la aŭtorino. Estis du konkursaj taskoj:

„1. Traduku senerare en polan lingvon la esperantan rakonton, la Feliĉa maljunulo”.

2. Priskribu en E-o hejman urbon aŭ vilaĝon, konsiderante landvidaĵon, lernejojn, teatrojn, kinejojn, historiajn antikvaĵojn kaj objektojn montrindajn al eksterlanda esperantisto.

La enhavo de 21 leciono: „Raporto pri Kongreso”; poste poeziaĵo de vietnama poeto Duo- inb- Kha, patoprenanto de la Kongreso, sub titolo; „Vizito al Varsovia palaco de Kulturo”.

Estis ankaŭ instruoj de kanzonoj. „Tra nokto varma” de Stanisław Moniuszko kaj „Brulas fajro”. Unu el lastaj lecionoj: „Letero de Tatjana al Onegin” el famkonata poemo de Aleksander Puŝkin. Mi legas kortuŝita: „Mi skribas al vi - kio plie?”

La temo de 39 leciono sonas triste: „Karaj Amikinoj, jen nia kurso de Esperanto en „Filipinka” estas finita”. Mi fermas la nigran kajeron kaj flankenmetas en la librobreton. Estas fino de decembro 2000. Estas fino de XX jarcento. Ĉu la lingvon de espero ni metos sur breton de historio, ĉu kontraŭe ĝi inspiras nin al kreativa vivo, dependas nur de ni.

Maria Ostrowska

ANTI-KVAĴEJO

Antaŭ 110 jaroj - Ludoviko Zamenhof estis devigita pro diversaj kaŭzoj preni sur sin la taskon de redaktado de „La Esperantisto”. Sed tiu tasko estis por li terure malfacila. En unu el leteroj li skribis: „mia situacio atingis lastan gradon de neebleco”.

Antaŭ 100 jaroj - la 9-an de aprilo 1901, generalo Sebert prezentis Esperanton ĉe la Akademio de la Sciencoj en Parizo. Li priparolis la sciencon utilecon de helpanta lingvo internacia kaj prezentis diversajn dokumentojn. La Raportoj de l’Akademio kaj multaj gazetoj donis resumon de tiu prezentado.

Antaŭ 75 jaroj - la 11-an de marto 1926 okazis la ĝenerala kunveno de „Societo ESPERANTO en Krakovo”. Prof-ro dr-o Odo Bujwid estis elektita la prezidanto de Societo. Sidejo de la Societo troviĝis en Rynek Gł. 34, II etaĝo.

Antaŭ 50 jaroj - la ĉefa evento de 1951 estis la 36 U.K. en Munkeno- Germanio. Ĉeestis 2000 kongresanoj el 40 landoj.

Antaŭ 25 jaroj - la juna generacio aktivis en Krakovo. En la studenta klubo “Nawojka” okaze de leter-vespero, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj, okazis distra programo. En la studentina kant-kvarteto, kiu prezentis diversnaciajn kantojn en E-o aktorinino inter alie nia koleginino Maria Majerczak.